

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE

Redaktoro : S-ro Gaston VERON, pl. de la Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne)
Sekretariino / F-ino J. LE BOEDÉC, 18, rue Ernest Cresson, PARIS 14°
Kasisto : S-ro J. LIGOT, 30, rue Fernand Segouin, ARNOUVILLE-LES-GONESSE
C.C.P. - PARIS - 51 74 79 - (Seine-et-Oise)

Abonnement : 2 Fr- Adhésion à La Ligue : 1 Fr.-; Total = 3 Fr CO.-
=====

N° 60

BULLETIN TRIMESTRIEL

--- TRIMONATA BULTENO ----

Sankta Pio X, preĝu por ni .

Januaro 1964

MOT DU PRESIDENT .

En ce temps de Noël, Chrétiens, notre joie est grande. Nous sentons que le monde s'entr'ouvre ... un peu, aux aspirations universelles, à la paix et à la fraternité. Nous trouvons des motifs nouveaux d'espérer.

Porte entr'ouverte : Berlin, où des familles séparées ont pu se rejoindre au moins le temps d'une brève visite.

Marche vers un monde meilleur : le Concile, donc les sessions rapprochent les chrétiens éloignés depuis des Siècles.

Cette magnifique perspective : Le successeur de Pierre accueilli en pays Musulman, en Terre d'Israël, priant sur les Lieux Saints, peut-être avec l'Orthodoxie Orientale.

Au-dessus des traditions, des particularismes, des divergences, les hommes sentent mieux le besoin de retrouver en commun la voie de la spiritualité. Ceux qui croient en Dieu unique, Transcendant, sentent le besoin de Le prier ensemble. D'autres, qu'une éthique supérieure anime, qu'ils appartiennent à une lointaine religion ou philosophie, qu'ils soient même agnostique, cherchent et trouvent parfois des terrains communs avec les croyants.

Le voeu que je forme pour mes frères, Espérantistes Catholiques, c'est que, sans rien abandonner : de leur attachement à l'Eglise, ils soient à l'avant-garde de cette évolution vers plus de tolérance et d'amour : tout en tous pour servir.

Notre langue commune, la culture universelle qu'elle apporte, nous rapproche de tous les hommes, à quelque pays ou race qu'ils appartiennent, à quelque foi qu'ils adhèrent. Je souhaite que l'Espéranto, par les moyens qu'il en donne, nous aide, avec la grâce divine, à être les diffuseurs du plus ardent message d'humanité, d'espérance et d'amour, à être des artisans de paix, condition essentielle du progrès spirituel.

R. Cl. COLAS.

..... FELIČAN KAJ GRACOPLENAN JARON 1964

+++++

----- PAPAJ VORTOJ -----

"Karaj Filoj de Francujo".

"Feliĉa Ni estas, pro la okazo al Ni hodiaŭ donita, ĉe la Franca Radiotelevizio, turni Nin rekte al vi, kaj povi, al vi ĉiuj diri kiaj sentoj animas Nin kontraŭ via lando".

"Francujo, kiamaniere kelvorte esprimi ĉion, kion elvokas en Nia spirito tiu ununura nomo, kiajn tradici-riĉaĵojn en la plej diversspecaj kampoj de arto, de scienco, de tekniko, kian heredan havon, ĉere religian, senĉese riĉigita de novaj aldonoj dum la jarcentoj".

"Ek de Nia plej juna aĝo, Ni admiris, la rangon kie staras en la kulturmondo viaj pensuloj, viaj verkistoj, viaj sanktecaj oratoroj. Ni legis, kaj primeditis viajn spiritajn aŭtorojn, kiuj tiel bone scias kunigi al la profundeco de la penso, la precizecon kaj la belecon de la beletra esprimo. Kaj kia ĝojo estis por Ni malkovri, dum, ho ve! tro rapidaj vpaĝoj, la tiel diversan harmonion de viaj pejzaĝoj, la ĉarmon de viaj provincoj, la trezorojn de viaj muzeoj, la splendoron de viaj katedraloj, la fervoron de viaj sanktejoj, speciale tiu de "Nia Sinjorino" en Lourdes (prononcu : "Lurd" = Lurdo : esperantlingve) de kiu ni havis la privilegion esti la pilgrimanto."

"Dum la jaroj de Nia Vatikana servado, sub du elstaraj Papoj, amikoj de Francujo, Pio XIIa kaj Pio XIIIa, multiĝis per Ni la okazoj kontaktiĝi kun remarkinduloj reprezentaj de la grandaj pens- kaj ag-fluoj, pri kiuj via patrolando estas tiel riĉa kaj tiel prave fiera. Kaj laŭmezure de tiuj kontaktoj, estis ebligita al Ni, pli bone ŝati la rolon de via lando en la historio kaj en la religia farado de la mondo, la originalecon, la maltimon, la dignon de viaj iniciatoj, ilian radiadon transege de viaj landlimoj".

(Mesaĝo de Paŭlo VI al Francoj, 6-an de Decembro 1963-).,

=====

xxx NOVAJ MEMBROJ xxx 1963 xxx

- S-ro APOSTELECO PARIS 6
- S-ro CHAPPELLIER NANCY
- S-ro LACHICHE BESANCON
- S-ro Jean LEYDER AUBENAS
- F-ino Gabrielle MOULIN, PONT D'AUBENAS
- S-ro Jean FAYET ISSOIRE
- S-ro Pierre REYNIER, AUBENAS
- S-ro Bernard JAHIER RENNES

+++++
+++ NOVAJ ADRESOJ +++

- S-ro BESSIERE St-MALO
- S-ro COLLEU IVRY-sur-SEINE
- S-ro DUTHILLEUL BESANCON
- Rév. Mère MARIE-NATALIE MONTPELLIER
- R.P. DEDEBAN PARIS 7

=====

ASSEMBLEE GENERALE DE LA LIGUE FRANCAISE CATHOLIQUE ESPERANTISTE

----- LE 8 MARS 1964 ----- à LA HOUSSAYE EN BRIE (Seine-et-Marne)

Nous espérons que ce choix hors de PARIS pour notre assemblée générale n'empêchera pas la participation de nombreux membres, au contraire, tous ceux qui sont déjà allés à La Houssaye se rappellent l'accueil chaleureux des Frères Missionnaires des Campagnes.

Pour aller à La Houssaye, en voitures, prendre la sortie de Paris par la Porte de Bercy (autoroute), ou par la Porte de Vincennes direction SEZANNE ou NANCY par la Nationale 4 : jusqu'à TOURNAN, prendre alors direction : COULOMMIERS (sur 8 Km. par la D. 216-) et vous êtes à La Houssaye-en-Brie.

Pour ceux qui n'ont pas de voitures particulières, nous conseillons le Car MARCEL GROS (ligne TOUQUIN) partant de la Porte de Vincennes, (Café-Tabacs "St-Claude", 114, crs de Vincennes) à 8 H 45. -----

Un autre Car "BIZIERE" (ligne AMILLIS) ~~partant de la~~ Porte de Vincennes (Café ~~de~~ ~~St-Claude~~ ~~114~~ ~~crs~~ ~~de~~ ~~Vincennes~~) pour ceux qui n'auraient pas le précédent. ~~5~~ (voir N.B.- en bas de page---)

Il y a aussi la S.N.C.F., Gare de l'Est (lignes Banlieue) départ à 7 H 25 (direction Sézanne) ----- arrivée à La Houssaye-Crévecoeur à 8 H 14. ---

(Pour les deux: Cars, la durée du parcours est d'environ 1 heure)

Nous pourrons participer à :

10 H 30 = à la messe paroissiale. (église de La Houssaye)

12 H 30 = repas en commun au Prieuré St-Martin, (prix : 6 Fr=)

s'annoncer au : Frère René-Jean MARMOU
Prieuré Saint-Martin
LA HOUSSAYE-EN-BRIE
(Seine-et-Marne)

----- par lettre ou par carte-postale, avant le 5 Mars 1964 .

Il serait prudent de me signaler, en même temps que votre inscription pour le repas, si vous venez par le Car MARCEL GROS = 8H45 = pour que je vous réserve les places. =====

(ainsi que le retour à 16 H 25)

à 14 H 00 = Assemblée générale de la L.F.C.E. -

----- Cars pour le retour à Paris, à 16 H 25 et 16 H 55.

----- ou par S.N.C.F.- à 19 H 33 et 21 H 33 -----

=====

---- N.B.- (en dernière heure) le 5-1-64, j'apprends que le Car "BIZIERE" - ligne Amillis -, a son départ : - à 9 h 10 = au Café "LA CIGALE" = 108, cours de Vincennes; métro : "Porte de Vincennes".

INFORMATIONS DIVERSES.

Tous les livres annoncés sur ESPERO-KATOLIKA peuvent se commander au libro-servo de I.K.U.E. par l'intermédiaire de Mr. MUFFANG C.C.P. PARIS -224 82-.

On peut aussi les commander à U.E.F. 34, rue de Chabrol PARIS 10 C.C.P. PARIS - 855 35 - U.F.E.

Nous vous recommandons les brochures dites : "Kajeroj de IKUE" et tout spécialement celle consacrée à l'Abbé PELTIER, fondateur de la revue ESPERO KATOLIKA.

Nous attirons aussi votre attention sur la traduction en espéranto de l'Encyclique "Pacem in Terris" = "La Surtere Paco".

Nous rappelons à tous la nécessité de régler au plus tôt les cotisations et que ceux qui sont en retard pour 1963 veuillent bien y joindre celle de 1964.

Un grand remerciement à ceux qui nous soutiennent en ajoutant un supplément à leurs cotisations.

I.K.U.E. avec la revue ESPERO KATOLIKA	9 Fr 25
Ligue Française Catholique Espérantiste	3 Fr 00

Nous invitons tous les Espérantistes Catholiques à participer autant que possible aux prières faites du 18 au 25 Janvier pour l'Unité Chrétienne et si possible à organiser une réunion de prières avec nos Samideanoj Protestants et Orthodoxes.

Nous vous mettons ici dans ce but un texte de la prière de l'Unité, en Espéranto :

Preĝo por la Unueco.

"Sinjoro Jesuo, kiu en la tago antaŭ via morto por ni, preĝis por ke viaj disciploj estu perfekte unu, kiel vi estas en via Patro, kaj via Patro en vi, faru, ke ni sentu kun doloro la malfidelecon de nia malunuiĝo. "Donu al ni senartifike konfesi kaj kuraĝe forĵetition, kio sin kuŝas en ni. Faru, ke ni renkontiĝu en via preĝanta koro, por ke en niaj animoj kaj lipoj senĉese supreniru via unika preĝo por la unueco de la kristanoj, kia vi ĝin volas, pli la rimedoj kiuj vi volas.

"En vi, kiu estas la perfekta karito, ni trovu la vojon, kiu kondukas al la Unueco en la oboe el via Amo kaj al via Vero." Amen.

=====

NIA SINJORINO DE BONA GARDO

En la vilaĝo de Longpont, apud Montléry, staras la Baziliko de Nia Sinjorino de Bona Gardo, ĝia konstruaĵo komenciĝis en 1031 por honorigi la Sanktan Virgulinon. Jam de longe en la regiono la Druidoj kaj niaj praavoj honoris tie nigran statuon. Oni trovis ĝin en trunko de maljuna kverko, kun la skribaĵo "Virgini pariturae" = "Al la Virgolino kiu kariĝos patrino". En la regiono oni konsideras Chartres kiel la filio de Longpont. Tuj post la konstruaĵo, venis

mulnombraj pilgrimantoj : Reĝoj, nobeluloj kaj mizeruloj ĉiuspecaj, kaj okazis multak mirakloj korpaj kaj spiritaj.

Iom post iom la pilgrimantoj malpliiĝis pro la spirito de la Reformo kaj precipe pro la granda Franca Revolucio.

Duondetruita, la Baziliko tamen venigis ankoraŭ kelkajn pilgrimantojn aŭ turistojn, kiuj helpis per donacoj al riparado. Nuntempe denove la intereso al N.S. de Longpont kreskas kaj ni intencas ankaŭ aranĝi pilgrimon tien por la Esperantistoj en 1964.

:::::::::::::::::::::::::::::::::::::
=====

EFEZO KAJ LA DOMO DE LA DIPATRINO .

Tri kilometrojn malproksimen de la malgranda turka urbo Selĉuk situas la imponaj ruinoj de la antikva urbo Efezo. Dum la greka kaj roma epokoj, ĝi estis la plej grava haveno kaj urbo en Azia provinco kaj ĝi pridisputis kun la urboj Smirno kaj Pergamo pri la honora nomvoko : Unua urbo en Azio.

En Efezo, ĉiuj el Oriento kaj Okcidento renkontiĝis. La karavanoj alportis el Ĉinujo silkaĵojn de la roma imperio. Bankistoj kaj komercistoj havis gravajn firmojn en Efezo. La Haveno estas plenplena je ŝipoj kaj galeroj.

En ĉiu loko de la antikva mondo, miloj da pilgrimantoj alfluis por viziti la templon de la diino Artemiso, kies pastroj forte kontraŭstaris la aposteladon de Sta Paŭlo (vidu Aktoj 19/23-41). Ekde la unuaj jaroj de la Kristanismo, la Evangelio estis ja anoncita al la Efezanoj kaj oni bone komprenas tion : la urbo estis grava kaj en ĝi loĝis multaj personoj; judoj kaj grekoj (Aktoj 19/10); Sta Paŭlo kaj Sta Johano loĝis en ĝi, la unua dum du jaroj, la dua ĝis lia morto. Oni martirigis lin jetante en bolantan oleon sur loko, kie staras ankoraŭ nun la rui-nigita baziliko al lia honoro.

Efezo estas nun nur turistloko, kie staras belaj kaj imponaj ruinoj de belegaj vidindaĵoj. Sed katoliko ne povas viziti ilin, sen pensi pri Sta Paŭlo kaj la unuaj katolikaj Efezanoj, al kiuj li poste skribis. Kun granda emocio oni sekvas la marmoran straton, sur kiu verŝajne marŝis la granda apostolo, admirante sendube la imponan konstruaĵon de la teatro, la bibliotekon de Celsius. Li plurfoje vizitis, kiel hodiaŭ la turistoj, la kvadratoforman agoraplacon apud la haveno, kie li enŝipiĝis, adiaŭante liajn disciplojn.

Nun ĉio estas ruinoj kaj la marbordo malprosimiĝis pro la aluvioj de la rivero Meandro sed oni ĉiam kaj ĉie sentas la ĉeeston de la unuaj kristanoj, niaj fratoj en la kredo.

Tamen la plej kortuŝanta loko ne estas Efezo mem sed la domo de la Dipatrino. Sur la montaro Panaya-Kapulu, ĝi situas en bele ombrita loko, kie kondukas nov-konstruita vojo. Dum pluraj jarcentoj oni perdis la memoron pri la situo de tiu domo. Sed dum la 19-an jarcento, germana religiulino, Katarina Emmerich, havis viziojn kaj poste ŝi priskrikis la lokon, indikante interalie, ke la Dipatrino ĉerpis akvon tute proksime de sia domo, kaj ofte promenadis ĝis granda roko en la montaro. Je la fino de la pasinta jarcento, kvar lazaristoj foriris al Turkujo,

